



Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, eks. prezidanto de la Kulturdomo de Francilingvaj Esperantistoj

J A R A B O N O

Jarabono : 80 fkoj

P. BABIN

Le Haut des Bourrellières

17, rue Romain-Rolland

85100 Le Château-d'Olonne

P.C.K Nantes : 2.813.61 L


(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

1995 — 3


(JULIO-AŬGUSTO-SEPTEMBRO)

EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



... Kino (dua parto) ...



... Kaj prezentado de Parizo

KULTURAJ KAJEROJ

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

REDAKCIA KOMITATO:

Jeannine VINCENT
26bis, rue de Milngavie
F-49150 BAUGE

Pierre BABIN
17, rue Romain Rolland
F-85180 CHÂTEAU D'OLONNE

ENHAVO

El Gresillon	paĝo 1
Esperanto tra la Mondo (Frangoul)	2
Prezentado de Parizo (tr. Waringien)	3-5
Aktuala uzo de proverboj (B. Golden)	6-7
La infano de Lebanono (tr. S. Boniol)	8-9
Espéranto kaj Kino (J. Fethke)	10-11
Homaro kaj naturo (Gorki - Newell)	12-
Por via Distro	14
La vivo en Gresillon	15-16

EL GRESILLON

PROJEKTO DE KOLEKTIVA MEMORLIBRO

Post nur kelkaj jaroj ni celebros la 50-jaran jubileon de la Esperantista Kulturdomo Gresillon. Celante konservi kaj konigi la historion de ĝiaj fondo kaj frua ekzistado, mi proponas ek de nun kolekti kaj stoki kiel eble plej interesajn kaj diversajn memoraĵojn rakontotajn de vi ĉiuj, kiuj spertis restado(j)n en Grésillon en ĝia frua ekzistoperiodo (1952--- jaroj 60); tio kompreneble ne ekskluzivas pli freŝdatajn memoraĵojn, sed ĉi-tiujn ni rezervos por posta etapo.

Do, al viaj skribilojn, tajpilojn, komputilojn... Verku tekston daktilografnorme 1- ĝis 3-paĝan, prefere en Esperanto, kaj sendu ĝin, kun - laŭvole, ne devige - viaj nomo, nuna loĝloko, se eble nigra-blanka (datita!) foto de vi, al: Marie-Thérèse Lloancy, B.P. 341, F-BILLERE CEDEX (Fr.), tel: 59 32 10 75 (resp.)

SOMERO 1995

Unuavide la ĵus finiĝinta somera "sezono", eble ne signata realtiĝon de la financaj rezultoj, almenaŭ montras finon de la malaltiĝo. Ĉu kuraĝiga elemento? Ĉu la asocio povos baldaŭ ne plu nur "kovri" la necesajn elspezojn, sed denove plikomfortigi, plimodernigi la kastelon? Ni atendu la "duan vidon", t.e. la provizoran financon raporton prezentotan okaze de la kunveno de la komitato, kiu okazos fine de oktobro.

Ĉiukaze ŝajnas, ke la ioma malkresko de la nombro da ĉeestantoj ne ŝanĝis la kutiman intereson por la kursoj kaj aliaj aktivaĵoj. La etoso daŭre estas duone "serioza", duone "feria". Tion atestas la leteroj, kiujn ni ricevas post la diversaj staĝoj. Sed, karaj korespond-amikoj, ĉu vi ne povus ankaŭ konigi vian kontenton al la gazetoj kaj informiloj eventuale eldonitaj de via loka grupo, de via federacia bulteno aŭ de nacia aŭ internacia revuo, klun vi regule legas? Grésillon - ankaŭ aliaj Esperanto-Centroj - ne estas sufiĉe konataj Dank'al via helpo ili devus esti. Dankon.

ESPERANTO TRA LA MONDO

TUTMONDAJ KONGRESOJ- La 80a universala kongreso de UEA okazis en Tempere Finnlando, dum la lasta semajno de julio. Ĉeestis 2 500 geesperantistoj. La organizado estis bonega. En sia lasta festparolado, Prof. John Wells omaĝis al Prof. Lapenna, longdaŭra prezidanto de UEA. Anstataŭis prof. Wells, kiel prezidanto, S-ro Lee Chong-Yeung (Koreio). Estis akceptitaj la aliĝoj de du landaj asocioj: la Rumana kaj la Togolanda. En 1996 la universala kongreso okazos en Prago (Ĉeĥio), de la 20-a ĝis la 27-a de julio.

Proksimume 300 gejunuloj kolektiĝis por la junulara kongreso apud Sankt-Peterburgo (31-a de julio - 7-a de aŭgusto). En 1996 la junulara kongreso okazos en Germanio.

La kongreso de SAT trovis lokon en Maribor (Slovenio). En 1996 ĝi okazos en Sankt-Peterburgo.

Preskaŭ 500 personoj el 24 landoj ĉeestis la Eŭropan Esperanto-kongreson en Parizo dum Pentekosto. La venonta EEK okazos en 1997 en Stuttgart.

La franca kongreso de UFE okazos en Villeurbanne en 1996 (16-19 de majo) kaj la kongreso de SAT-Amikaro en Orly dum Pasko.

La fervojistoj aranĝis la internacian kongreson de IFEF en Pecs (Hungario), kun 343 gekongresanoj el 23 landoj. En 1996 la kongreso de IFEF okazos en Hago (Nederlando) de la 11-a ĝis la 18-a de majo.

EN LA FRANCAJ LIBRO-VENDEJOJ- La eldonejo Ramsay ĵus publikigis "L'homme qui a défié Babel". La temo estas la vivo de Zamenhof, verkita de René Centassi kaj Henri Masson. Tiu altvalora verko ŝtopas truon en la informado pri esperanto por la ĝenerala franclingva publiko.

Kun "Le défi des langues" de Claude Piron (Eldonejo L'Harmattan), "L'Esperanto" de Pierre Janton (Que Sais-je?), "Esperanto sans peine" de Jean Thierry (Assimil), "Vocabulaire Esperanto" de M.K. Duc-Goninaz (Ophrys) kaj "La recherche de la langue parfaite" de Umberto Eco (Le Seuil) ekzistas nun la ebleco sugesti al la libro-vendistoj la aranĝon portempan de vitrina ekspozicieto. Oni povus ankaŭ aldoni "Les langages de l'Humanité"

enciklopedio de 3000 lingvoj parolataj en la mondo (Robert Laffont). Esperanto estas pritraktita en 8 paĝoj tre serioze, sur la sama ŝtupo, kiel la aliaj vivantaj lingvoj.

Estas konsilite mendi tiujn librojn al la librovendistoj por atentigi ilin pri esperanto. **INTERNACIA TRADUKRETO ITRE-** Tiu tradukreto konsistas el 35 tradukantoj por 24 lingvoj. Ĝi estas leĝe registrita kaj povas proponi siajn servojn al la entreprenoj de ĉiuj landoj. La kunordiganto estas: Daniel Durand, "Les Nids", 49190 Saint-Aubin-De-Luigné, Francio, Telefakso: 33.41.78.47.75.

RENDEVUOJ EN "LA KVINPETALO"-

24a-28a de oktobro: Omaĝe al Jean Thierry, pedagogo, aŭtoro, kanzonisto, tradukisto.

30a-3a de novembro: Praktikado de la lingvo; preparado al la parola parto de la Atesto pri Kapableco (nova formo).

10a-15a de decembro: Zamenhof-semajno. "Kvinpetalo" route de Civaux, 86410 Bouresse, Francio.

ESPERANTO SUR LA RETO INTERNET- Se vi interesigas pri la informatika informa reto Internet, sciu ke esperanto-kursoj funkcias sur tiu reto. Rilatu kun: Edmund Grimley Evans, St John's College, Cambridge CB2 1TP, Britio. Li ankaŭ redaktas "Eŭropa Esperantisto", kiu informas pri la esperanta agado en Eŭropa Unuiĝo.

VERDULAJ ESPERANTISTOJ- Se vi simpatias kun ekologiismo vi povas rilati kun AVE, kiu nun havas membrojn en 19 landoj, eldonas bultenon kaj kunlaboras kun la diversaj esperanto-asocioj. Skribu al Manfred Westermayer, Kandelstr. 62, D-79194 Gundelfingen (Germanio).

KULTURAJ ARANĜOJ- De la 4a ĝis la 11a de novembro 1995 okazos la 3-a Internacia Kultura kaj Turisma Esperanto-Semajno en la urbo Salu (Tarragona, Hispanio). Adreso: Kultura Sekcio de Hispana Esperanto-Muzeo, poŝtkesto 15027, 08080 Barcelono, Katalunio, Hispanio.

Kultura esperanto-Festivalo okazos de la 6a ĝis la 11a de aŭgusto 1996 en Kopenhago, kun ĉiusecaj artistoj. Rilatu kun Jacob Nordfalk, Radmandsgade 53, 2, th., DK-2200 København, Danlando.

Prezentado de Parizo je la kvina vespere

— JULES ROMAINS —

Antaŭ la pordego del Sankta-koro provincanoj, fremduloj, alvenintaj nur hieraŭ, rigardis Parizon atingitan de la ondaj movoj del ombro kaj indikigis al si la monumentojn. Aliaj, malproksime, forlasis la lanternon del Panteono, la turojn de Notre-Dame, malfruadis en la ŝtuparo del Eiffelturo, tute frostigitaj del vento kaj vakuo. Del balkono de sia laborejo, en Caulaincourt-strato, pentristo vidis ondegi la nordajn antaŭurbojn, kun siaj fabrikoj, siaj fumo, kun la blankaj neĝeroj del lokomotivoj, ĝis la montetoj de Pierrefitte... En la centro la vastaj vespermovadoj, la longaj supreniradoj al Nordo kaj Easto, similaj al senfina spirado, apenaŭ komenciĝis. La homfrekvento jam forlasis la internon de la Borso kaj de la bankoj, malpliigis ĉe la etaĝoj del komercejoj, sed pliigis kaj plidensiĝis en la stratoj. La butikoj eklumiĝis ekde la fundo... Uzintrumpoj fajfadis; la stacidomaj horloĝoj montris la kvinan. Kvar, sep, dekunu ekspresaj trajnoj ruliĝis al Parizo. La kvar, kiuj malproksime rampadis, eliris apenaŭ el provinco. Ili ĵus deiris de la lastaj urbejoj, kiujn Parizo lasas kreski je kelka distanco. De kiam oni penetras kiel en ĝin, Parizo nesenteble jam komenciĝis.

Tri aliaj, multe pli proksimaj, trairas kamparojn ensorbitajn kaj konkeritajn, sed ankoraŭ belajn, en la oblikva fluo de orbruna sunsubiro. Ili alvenis al la dua cirklo, al tiu, kiun difinas, ĉirkaŭ dekdu leŭgoj for de Notre-Dame, la ĉeflokoj del maljunaj landoj de Ile-de-France. La kvar ekspresoj, kiuj alkuradis la unuaj, jam atingis la najbaran ĉirkaŭurbon, sin enŝovis en ĝin, malrapidiĝante. La unua venis de Lyon, alia de Lille, alia de Bordeaux, alia de Amsterdam.

Parto de la centro komencis malstreĉiĝi; vigla fluo de veturiloj progresis en direkto al uesto, kaj kontinua svarmado de piedirantoj ŝtopadis ĉiujn vojojn, kiuj iras de Concorde al Bastille. Estis la horo, kiam en la stratoj la proporcio de riĉuloj estas plej granda; kiam la magazenejoj, akre iluminitaj, pleniĝas de virinoj; kiam la virinoj ŝajnas esti ĉie pli multaj kaj pli feliĉaj ol la viroj; kiam laŭtiĝas en preĝejoj delikata bruo de preĝado, sub la sola lumo del kandeloj; kiam la infanoj del popolaj kvartaloj kriante sin pelas sur la trotuaroj.

En la stacioj del subtera fervojo, vojaĝantoj, ne ĉesante gvati la estontan tondron de trajno, ekzamenis la planon, serĉis straton. Aliaj, kiuj vidis ilin tiel agi, rimarkis la planon, ankaŭ rigardis, eble por la unua fojo ili klarigis al si la formon de la urbo, pripensis ĝin, ekmiris pro la orientado de bulvaroj, pro la dimensio de la arondismento. Koĉeroj, ŝoforoj akceptis klientojn, aŭskultis nekutiman stratnomon; tiam Parizo malvolviĝis en ilia kapo, en ilia plurkora, netuŝebla Parizo farita el vivantaj linioj, el sentitaj distancoj, sorbigitaj de movadoj, kiel spongo kaj misformita de la senĉesa fluo del proksimiĝantaj kaj foriĝantaj aferoj. Subite, en tiu Parizo, kiun ili identigis al si mem, la strato pikis ilin ĉe preciza punkto, kaj ili iris al ĝi kvazaŭ al juko. En la oficejoj del Prefektejo, ĉel ekstremo de ĉiam malpuraj koridoroj, homoj kun lustrinaj manikoj adicilis naskiĝojn, diferikazon, akcidentojn per ĉevalkaj motorveturiloj, kvadratmetrojn da asfaltita ŝoseo, cent kilogramojn da vivviando, biletojn de subterferovo laŭ stacioj kaj linioj, kostojn po vojaĝanto-kilometro. Kliniĝantaj kiel anatomoj super ia sensanga Parizo, ili detranĉis de ĝi longajn rimenojn da ciferoj.

La homoj en la dekunu ekspresoj pensis al Parizo. Kiuj jam konis ĝin, tiuj reprezentis al si precizajn stratangulojn, hejmojn, vizaĝojn; faris jam antaŭe siajn klopodojn, gestojn, respondojn en ĝustaj lokoj; sternis sin jam antaŭe en liton, en kiu la dormo atingos ilin laŭ preciza maniero. La novevenintoj metis al si demandojn, metis ilin al la kamparo trans la vitroj, al siaj pakaĵoj, al la rapide preterpasantaj stacidomoj, al la konvekso lanternon del kupeo, al la vizaĝo de silenta apudsidanto. Ili angore serĉadis kaj kolektis ĉiujn viziojn, kiujn ili imagis al si pri Parizo. Ili malvolvis fantaziajn dekoraciojn ĉirkaŭ konataj estaĵoj. Ili dotis per ia voĉo, rigardo, korpulenteco la nomojn, kiujn oni skribis al ili sur paperpecetoj. Ĉirkaŭ la periferio, teren-spekulaciistoj padelis en la koto de nefinitaj stratoj, levis la kapon por rekoni, laŭ la lumoj del sunsubiro, la direkton del nordo, del sudo; okulesploris pasantan maljunulinon, stratlanternon, la drinkejon ĉe la angulo, aŭskultis la rulbruo de aŭtobuso, flaradis la venton, kvazaŭ la estonto parolus tuj al ili, mallaŭte. Vendisto

de laĉoj kaj kraĵoj, forlasante la regionon ĉirkaŭ la pordego Saint-Denis, malsupreniris tra la bulvarado Sebastopol al la Châtel-et kaj Urbodomo, kvazaŭ fiŝeca instinkto antaŭsentigus al li, ke iaj akvoj, laŭ la horoj, estas pli aŭ malpli favoraj. La poŝtelistoj, ankoraŭ pli impresblaj de la nuancoj del homamaso, fordonis sin al analogaj migradoj. Kaj la publikulinoj, kiuj ne havas kapricojn, iris fidele reokupi sian postenon sur la gvatvojo de l'korpa amo.

Tiam la liceanoj, en la studĉambroj, mordetante sian plumington aŭ taŭzante al si la harojn, sekvis la lastajn tagrebrilojn pelitajn de la gaslumo sur la glacea kurbo del grandaj geografiaj kartoj. Ili vidis la tutan Francion: Parizon, metitan kiel dika glueca guto sur la 48-a paralelo, kaj fleksante ĝin sub sia pezo; ili vidis Parizon strange kroĉitan al sia rivero, haltigitan per ties buklo, kojnumitan kiel perlo sur tordita fadeno. Oni eksentis deziron maltordi la fadenon, glitigi Parizon almonte ĝis la kunfluejo del Marne, aŭ alvale kiel eble plej proksime al maro.

Aliloke, en hotelĉambro, en iu kerno del homamaso, en kupeo de ekspreso, estis iu, dum minuto, kiu revis pri la formo aŭ la grandado de Parizo. Iu serĉis ciferon en sia memoro, komparis, ekmiris. Kelkaj konsultis dokumentojn, librojn, gvidfoliojn. Vojaĝantoj, kiuj estis rigardintaj Parizon de la alto de turo, konjektis, malsuprenirante la helikŝtuparon, la radion de tiu tutplene humana horizonto. Aliaj, de malproksime venintaj, sin demandis: "Ĉu estas ĉi tie pli da homoj ol en la "subway"? Ĉu mi estas pli puŝpelita ol sur la ŝtonplatoj de Cheap-side?" Sed la liceanoj turnis la okulojn al la eŭropa karto. Kaj tie oni vidis ankoraŭ Francujon, oni ekvidis ĝin tuj, kiel ion arkiĝintan, preskaŭ prancintan ĵel antaŭo del kontinento, ion tamen kelke retiriĝintan, grandvaloran, ŝirmitan de pli riskemaj elstaraĵoj. Azio kaj Eŭropo turnas al si reciproke la dorson; Eŭropo, marŝado al okcidento, fluegas al uesto. Parizo, reduktita ĝis punkto ŝajnis okupi la lokon deziritan de Eŭropo.

El "La homoj de bona intenco"
tradukis Gaston Waringhien

Preĝo sur la Eiffelturo

— J. Giraudoux —

...Jen la Eiffelturo; Dio mia, kian fidon en la universa gravitado havis ĝia inĝeniero; Sankta Virgino, se por sekund-kvarono la hipotezo pri la pezeleĝo estus mispensita, kia grandioza rubo! Jen kion oni konstruas per hipotezoj! Jen realigita el fero la ŝnuro, kiun ĵetas al ĉielo la fakiro, kaj per kiu li invitas siajn amikojn grimpi... Mi konis Eiffel-on, mi grimpas... Dio mia, kiel ĝi estas bela, vidita de la deirkaĝo kun sia larĝa surtrikaĵo, stebita ĝis la dua etaĝo, kiel al impona ŝtrumpeto! Sed ĝi ne estas konstruaĵo, ĝi estas veturilo, navigilo. Ĝi estas maljuna kaj flikita, kiel ŝipo, samaĝa kiel ĝi, kiel ankaŭ mi, ĉar mi naskiĝis la monaton, dum kiu ĝi eliris el tero. Ĝi havas tiun aĝon, kiam oni plezure sentas sin surgrimpataj de infanoj kaj amerikaninoj. Ĝi havas tiun aĝon, kiam la koro ŝatas provizi sin per koncertoj je sia supro. Ĉion kion mi amas en la transatlantikaj ŝipoj, tie mi retrovas. Nekomprenblaj parfumoj, demetitaj en ŝtala lozanĝo de unu pasinto kaj tiel fiksay en sia alto, kiel ĉerko en maro, tenata de sia kuglego; sed precipe nomoj de sirianoj, de kolombianoj, de aŭstralianoj, gravuritaj ne sur la pavezoj, sed sur ĉiuj vitroj, ĉar la materio plej impresbla kaj modlebla de tiu turo estas la vitro. Ne unu fremda vizitinto, kiu tien supreniris sen diamanto...

Oni translokas nin ĉiuminute de lifto al lifto, por erarigi mi ne scias kiun persekuton, kaj kelkaj vojaĝantoj, senembarasigitaj de siaj nomoj kaj antaŭnomoj ekde la dua etaĝo, vagas sur la tria kun malprecizaj okuloj, serĉante pseŭdonimon aŭ idealan patronon.

Oni permesas kvaronhoran halton sur tiu ĉi plataĵo. Sed por tiuj dekkvin minutoj da izoleco, Eiffel kolektis ĉion, kio sufiĉas por dekunu monatoj al la pasaĝeroj del ŝipo, kiu rondiras la teron, dek barelludojn, dek aŭtomatajn orakolojn, mekanikajn birdojn laŭ dekduoj kaj la friziston. Ĉiu ekspozicio lasis tie alte sian aluvion, iom da universala aluvio. Tiu de 1889, stereoskopajn aparatojn, en kiu oni vidas la negrinojn de ĉiu tribo en Kongolando disetendi la okulojn kaj la

mamojn antaŭ miregiga spektaklo, kiu povas esti, tiel similaj estas iliaj surprizoj, nur la aspekto del fotografisto. Tiu de 1900 rusajn vortojn. Moskvo, Kronstadt ascendis ankaŭ por gravuri siajn nomojn... Sed kiel la muzeo Galliera estas bela de tie ĉi! Kaj tiuj disputoj, per kiuj malpacas sube Notre-Dame kaj la Sankta-Koro, la Panteono kaj la Lyon-stacidomo, kiel oni vidas de tie ĉi, ke ili estas tromparanĝitaj por iom amuzi homojn, kaj male, ke estas inter ĉiuj tiuj konstruaĵoj nur akordo kaj nur konsento! Ĝi laksigitaj hodiaŭ per magneto, kiu estas sendube la amikeco, la Aleksandra ponto kaj la ponto del Konkordo preskaŭ sin proksimigas kaj kunigas...

Do, mi havas sub miaj okuloj la kvin mil hektarojn en la mondo, kie estis plej multe pensate, plej multe parolate, plej multe skribate. La vojkruco en nia planedo, kiu estis plej libera, plej eleganta, malplej hipokrita. Tiu delikata aero, tiu malpleno sub mi estas la tavoloĝoj, (kiom akumulitaj! del spirito, del rezonado, del gusto. Do, pri ĉiuj tiuj malpliĝoj kaj stumpigoj, kiujn suferis homoj, estas pli probable ĉi tie ol ie ajn, inkluzive de Babilono kaj Ateno, ke ilin kaŭzis la lukto kontraŭ la malbela, tiraneco kaj materio. Ĉiuj laborakcidentoj estas tie ĉi pensakcidentoj. Pli probable estas ol aliloke, ke la kurbigitaj dorsoj, la faltoj de tiuj burĝoj kaj metlistoj estas ricevitaĵoj pro la legado, la presado, la bindado de "Descartes" kaj "Pascal"; ke tiuj nazumoj iĝis necesaj pro "Commines" kaj "Froissard"; ke tiu malforto ĉe la palpebroj estis ricevita dum kopiado del heraldika gvidlibro aŭ, en metiejo, pro tio ke homoj ne volis kompromisi pri la kromflavo aŭ skarlatato; ke tiu stumpulo perdis, tranĉitajn, la fingron, poste la manon, poste la alian manon retenante apud la radiumo la barkon (se vi volas kaj ekkomprenis la aludon al tiu Salamina batalo) de niaj doloroj. Jen la hektaro, en kiu la kontemplado al Watteau kaŭzis plej multajn tempifaltetojn. Jen la hektaro, en kiu la komisiioj por enpoŝtigi Corneille, Racine kaj Hugo estigis la plej multajn varikojn. Jen la domo, en kiu loĝas la laboristo, kiu rompis al si la kruron riparante la memorplaton de Danton. Jen, ĉe la angulo del Volterkajo, la centiaro, en kiu oni akiris plej da renŝtonetoj batalante kontraŭ la despotismo. Jen la kvadratcentimetro sur kiun, en la tago de lia morto, falis la sango de Moliere. Okazas, ke en tiu strika tago, kiam la metioj ŝajnas nelabori en Parizo, kiam la laboristoj, kredante

kontraŭstari al sia naturo, kaj obeante nur al la ava kutimo, reiris al kamparo, Parizo plenumas la puran metion de Parizo.

El "Ĵulieta en la virlando"
Tradukis Gaston Waringhien

PLEDO

Vidu: en la vakuruinejoj
la poetoj nenion rompas
ili, kiuj eĉ vortojn malfermas
kiel tre helajn panoramojn
de vermomentoj.
ho, sunoj!

modulata songorevo
de l'interna sangovoĉo
ĝis l'eterna horizontolimo
kiel starpunkte oceana svarmo
l'elektonta lingvo al ili traviĝas
ho, benindaj sunoj!

kaj trans la nemankebla neebleco
por ravan reale kreaĵon krei
kiel blanke vekigantaj velŝipoj
drive ĝirantaj al ni
eliĝas la nesolveblaj poemoj.

DORLOTANTE

Kiam ŝia infano fine silentas
ŝi por lin redormigi dolĉe inventas
"ronda nokto ronda kor' volas mi do
dormi dormon oran dormon dormu do"

Konfidante l'infano nun lule flugas
kaj en la maran sinon aere plugas
"ronda nokto ronda kor' volas mi do
dormi dormon oran dormon dormu do"

Nun ek el akvo lia hundid' eliĝas
lude sur herbej' ili longe kuniĝas
"ronda nokto ronda kor' volas mi do
dormi dormon oran dormon dormu do"

En la silento ŝia voĉo softiĝas
ĝis al ripozo ankaŭ ŝi enŝoviĝas
"ronda nokto ronda kor' volu vi do
dormi dormon oran dormon dormu do."

fra gae

LA AKTUALA UZO DE PROVERBOJ EN ESPERANTO

(Bernard Golden)

Proverbo estas sperto, proverbo estas avertito (Z) Antaŭ kelkaj jaroj aperis artikolo en "Kontakto" (1) el la plumo de Anna Brennan, en kiu estas esprimita la opinio, ke la nuntempa homaro ne plu bezonas proverbojn. Laŭ la mallarĝa vidpunkto de la aŭtorino, tiu parto de la frazeologio troviĝanta en ĉiuj lingvoj estas elmodiĝinta vestiĝo de la pasinteco. Brennan argumentas, ke nuntempe ĉiu scipovas legi kaj tiel havas aliajn, pli bonajn, manierojn akiri informojn kaj transdoni sciojn. Tiu erara pensmaniero rezultas el miskompreno pri la vera esenco de proverboj. Ili ne simple donas informojn kaj opiniojn pri la mondo. Efektive, proverboj estas grava literatura ĝenro en ĉiuj kulturoj, eĉ ĉe tiuj popoloj sen la propra skribsistemo. Estas sciata, ke nesurpaperigitaj folklorajĵoj estas tre efike transdonataj perbuŝe de unu generacio al la sekva.

Por saĝulo sufiĉas aludo (Z) - En tiu ĉi artikolo mi erudas Anna Brennan pri la aktuala funkcio de proverboj kiel tradicia kultura rimedo por esprimi sciojn kaj sentojn pri ĉiuj aspektoj de la vivo. Tion oni povas observi en modernaj socioj kaj ankaŭ inter esperantistoj, malgraŭ tio, ke ili vivas diaspore. Por pravigi mian starpunkton, mi prezentos parton de mia kolektaĵo da citaĵoj el gazetoj, revuoj kaj libroj aperintaj en la lastaj jaroj. Ili ilustras kiel daŭre ĉerpas el la riĉa tutmonda provizo da proverboj ne nur beletristoj; ankaŭ ordinarnaj esperantistoj volonte ornamas sian stilon per trafaj kaj saĝaj eldiroj. La plej ofta fonto estas "Proverbaro Esperanta" kompilita de d-ro Zamenhof (2). Krome, verkantoj esperantigas proverbojn venantajn de diversaj etnolingvoj, kaj estas ankaŭ kelkaj talentaj homoj, kiuj kapablas krei originalajn proverbojn en Esperanto. Tiuj signifitaj per la litero "Z", estas registritaj en "Proverbaro Esperanta". Ili estis elektitaj, ĉar, troviĝantaj en publikigitaj verkoj, ili estas uzitaj en kuntekstoj kaj tiel funkcias kiel akcepteblaj elementoj de la frazeologio de Esperanto. Rimarku, ke aŭtoroj ne ĉiam citis proverbojn laŭvorte; jen ili ne precize memoris la originalan version, jen ili intence modifis la vortigon, por ke ĝi fariĝu nuancita. En tiuj kazoj aldoniĝas la originala versio por komparo.

Artikol-titoloj - Uzo de tre trafa proverbo povas tiri atenton al verko kaj samtempe fari aludon pri la enhavo. En la unua ekzemplo, ĉefa esperantisto verkis memorajn pri pastro, kiu pro nekutimaj cirkonstancoj devis prediki du fojojn, kaj li titolis sian artikolon per jena ĉefa proverbo: "Pastro predikas nur unu fojon" (STARTO, 1/2 1994, pĝ. 26. Kataluno donis al sia polemikaĵo iom longan titolon: "Vidi ligneron en okulo aliula, sed en sia propra ne rimarki trabon". (BOLETIN, n-ro 315, 1994, pĝ. 23) Tie ĉi ni havas ilustraĵon de modifo de la zamenhofa versio, kiu tekstas jene: "En fremda okulo ni vidas ligneron, en nia trabon ne vidas".

Motoj kaj Epigramoj - kelkaj aŭtoroj havas la kutimon aldoni al siaj verkoj moton aŭ epigramon, kiuj aperas post la titolo kaj antaŭ la unua alineo de la teksto. En libreto temanta pri lingvo troviĝas la sekva tre celkonforma moto en du lingvoj, la gaela kaj Esperanto: "T'ir gun ch'anain, t'ir gun anam" (Lando sen lingvo estas lando sen animo) (G. MacAoidh: La Gaela Lingvo en Skotlando, 1991).

Ĉapitro-titoloj - Ankaŭ la titolo de ĉapitro povas havi la formon de proverbo. Komercisto Cezaro Rossetti uzis plurajn proverbojn tiumaniere en sia aŭtobiografia romano. La plejmulto venas de "Proverbaro Esperanta" kiel tiu ĉi: "Per lerta admono alfluas la mono" (Kredu min, sinjorino! 1950, dua eldono, 1974, pĝ. 122).

Titoloj de sekcioj de artikoloj - En artikolo temanta pri konfliktaj politikaj ideologioj, la aŭtoro titolis unu el la sekcioj: "Se vi semas venton, vi rikoltos tempestojn" (INTERNACIISTO, 5/1994, pĝ. 8). Ĝi estas variaĵo de la zamenhofa proverbo: "Kiu semas venton, rikoltos fulmotondron". Ankaŭ unu samsenca variaĵo aperas en la Malnova Testamento: "Kiu semas maljustaĵon, tiu rikoltos suferon".

Interne de tekstoj - Plejparte proverboj estas uzataj en la teksto mem, kaj ofte la aŭtoro informas legantojn, ke temas pri proverbo kiel en tiu ĉi citaĵo: "Laŭ malnova proverbo: ĉiu miraklo daŭras dum tri tagoj" (Monato, majo 1994, pĝ. 7). La verkinto, kiu estas hungaro, tradukis ĝin el sia gepatra lingvo. La redaktoro de nova periodaĵo, pritraktante siajn taskojn, skribis: "Oni diras, ke apetito venas dum

manĝado" (UKRAINA STELO, 1/1994, pĝ 4) Zamenhof iom alimaniere diris, tion: "Dum la manĝado venas apetito". En nova libro pri metodologio de lingvo-instruado, la aŭtorino pritraktas erarojn en la lerno-procezo kaj ŝi konsolas lernantojn per jena proverbo: "Nur tiu ne eraras, kiu nenion faras" (Irena Szanser: TEORIO KAJ PRAKTIKO DE LINGVO-INSTRUADO, 1992, pĝ. 79). En "Proverbaro Esperanta" ĝi iom alimaniere tekstas: "Nur tiu eraras, kiu neniam ion faras".

Fino de verko - Same okulfrapa kiel la uzo de proverboj en titoloj estas ilia citado ĉe la fino de verkoj, kie ili funkcias kiel frap-frazoj, precipe en polemikaĵoj. Per la sekvaj du zamenhofaj proverboj la verkintoj de artikoloj volas jen averti, jen riproĉi aliajn homojn. "Zamenhof diris: Konfidu sed vidu" (MONATO, septembro 1974, pĝ. 16) "Malsaĝulo diris vorteron, saĝulo komprenas la tutan aferon" (MONATO, septembro 1994, pĝ. 21). En la sekva ekzemplo, la fina frapfrazo estas modifita. "Ĉu fakte veras la slogano: Hejme neniu estas profeto?" (STARTO, 3/1994, pĝ. 17). Zamenhof registris ĝin kiel: "Neniu estas profeto en sia urbeto".

Proverboj en enigmoj - Ankoraŭ unu ofta loko por proverboj estas en enigmoj. Tiu ĉi serba proverbo aperis en la solvo de kruc-vortenigmo. "Se kaprino mensogas, kornoj ne mensogas" (ESPERANTISTO SLOVAKA, 4/1994, pĝ. 10). Alia formo de vortenigmo donis al solvintoj la zamenhofan proverbon: "Beleco logas, virto apogas" (DEBRECENA BULTENO, n-ro 82 1994, pĝ. 51).

Fremdlingvaj citaĵoj - Kelkfoje proverboj estas cititaj en fremda lingvo kun aŭ sen traduko. La redaktoro de la novaĵ-letero de la Akademio de Esperanto paradigas sian scion de la latina lingvo per jena gemo de saĝo: "Erare humanum est, perseverare diabolicum" (LA LETERO DE L'AKADEMIO DE ESPERANTO, 18/1992, pĝ. 2). Piednote aperas la Esperanta traduko: "Erari estas home, persisti demone". Kiam ne nur mankas traduko de proverbo, sed aperas nur parto de la tuta esprimo, legantoj alfrontas veran enigmon - "De gustibus et coloribus..." (Lorjak: KROMOSOMOJ, 1989, pĝ 31). Eĉ se oni sukcesas traduki ĝin per "Pri gustoj kaj koloroj..." ĝi ne estas senchava pro sia stumpigita formo. En lingvo kaj Vivo", G. Waringhien citas la

plenan latinan proverbon kaj tradukas ĝin: "De gustibus et coloribus non disputandum" (Pri la gustoj kaj la koloroj oni ne diskutu!". Zamenhof iom alimaniere esperantigis tiun proverbon: "Pri gustoj oni disputi ne devas".

Originalaj proverboj - Fine ni ekzamenu proverbon verkitan originale en Esperanto, en kiu la aŭtoro simple substituis novajn vortojn al kelkaj en bone konata proverbo. "Iĝi kolera estas homa, resti kolera estas diabla" (LEVILKARTO de Movado sen Nomo, 4/1994). Ĝi estas modifo de la latina proverbo en la antaŭa sekcio. Rimarku, ke estas necese ĝustigi ĝin gramatike; "homa" kaj "diabla" devas esti "home" kaj "diable" respektive.

Se fremda la fako, restu ferma la faŭko! - Per prezento de kelkaj ekzemploj de la uzo de proverboj en nuntempaj tekstoj publikigitaj en diversaj periodaĵoj kaj libroj, mi demonstris, ke proverboj estas sen nubo da dubo parto de la Esperanto-kulturo. Ili havas signifon por tiuj, kiuj uzas kaj legas ilin. Anna Brennan mizere mispaŝis, kiam ŝi facilanime asertis, ke "...proverbo estas vorta floro: bela sed ne necesa." La esperantistaro hodiaŭ ja volas koni kaj konservi sian frazeologian heredaĵon kaj eĉ krei novajn esprimojn.

Kiu komprenis la mesaĝon,
Tiu ne petas ripetadon.

Notoj (1) Anna Brennan: "Ĉu veraj proverboj povas ekzisti en Esperanto?" KONTAKTO, 5/1987, pĝ. 6.

(2) L.L.Zamenhof. "Proverbaro Esperanta", La Laguna: J. Regulo, 1961.

KIEN MI DEVAS SENDI MIAN ABONON ?



Ne plu cerbumu ! Rigardu la unuan kovrilpaĝon (franca) adresoj, aŭ la lastan

LA INFANO DE LEBANONO

Mansour Labaky, kiu vivas kaj agas sammaniere, kiel li revas, kiel li amas, persone estas kvazaŭa vagulo de l'favorkoreco. Estiginto de socialaj fondaĵoj, konstruinto de "hejmoj de l'ĝojo", tiu pastro ankaŭ estas poeto, prikantisto. En siaj romanoj li prikantas Lebanono. Li senpene, kvazaŭ nature, eltrovas la ĝustajn vortesperimojn kapablajn vibrigi la plej en ni sentivan lokon. Kion li diras, ĝi estas ja tio, kion ni volintus diri. Kio plej novas en li eĥas, kiel kanto praa. Finleginte liajn librojn ni sentas por la homoj kaj objektoj ian tenerecon al la lia similan, ian tenerecon, disradiantan bildon de eterna amo.

Verki pri infanoj en milito enkaptitaj, senkulpaj viktimoj de la plenkreskula krueleco, tio estas strangaĵo. Facila kormolado, eĉ larmado timindas. Sed la libro la insidon evitas. En lebanona orfejo du tre junaj knaboj ekamikigas. Nasim perdis la tutan familion dum bombado. Jad ankoraŭ havas la patron kaj ekprotektas tiun duoblan orfon. Pura kaj sovaĝa amikeco ebligas, ke ili transpaŝu la limon de mal-espero. El tiu poemrakonto, kies liriko des pli emocias, ĉar ĝi tre diskretas, venas granda leciono: amo estas konstruanto de lumo.

(laŭ la antaŭparoloj de du libroj samaŭtoraj)

El mia montaro, dum mi estis infano, la maron mi ekvidis fundfunde okcidente, belan, senliman, misteran kun ties silkebluaj somermatenoj, lumŝprucigataj tagmezoj, stel- kaj lunomuaritaj noktoj. Mi kredis, ke ĝi finiĝas ĉe la horizonto, kie la suno kaŭriĝas en purpura kaj ora ŝajnobrilado, aŭ sinkas en amason da nuboj pluvojn antaŭanoncantaj. Ĉe niaj piedoj ĝi banadis mallarĝan bordon etendiĝantan laŭ longaj citrusejoj, kies ebriliga aromo en la floradotempo ĝis ni suprenleviĝis, tirata de la venteto. Vere ni loĝis tro alte por ricevi la ebenajajn odorojn. Sed tial, ke mia patrino ilin ĝuflaradis, kun la okuloj briligataj de ĝojporta emocio, mi nur povis imiti ŝin, konvinkiĝeme post ŝi flaranta, flanke de miaj propraj perceptaĵoj. Mia patrino ja estis mia patrino kaj mi kredis, ke ŝi aŭdas, sentas kaj vidas multege da aferoj de la ceteraj neatingeblaj. Ekzemple kiam,

dum la somervesperoj, ni ĝuis la splendon de stelumita ĉielo, mi certis, ke ŝi estas ververe vidanta la internon de la paradizo kiun ŝi rakontas al mi. Kaj dum mi estis ĉe ŝi, kaŭra, multe pli tra la mildeco de ŝia voĉo, ol tra ŝiaj paroloj mi trasorbiĝis de la mistera, tamen tiel intensa ĉeesto de Dio. Poste mi eksciis, ke la florantaj oranĝarboj bonodorigis iajn aparte feliĉajn rememorojn de mia patrino. Eĉ multe pli poste mi komprenis, ke oni povas vere flarĝui laŭ rememorigo.....

.....Tiu vesperon, je la dormohoro, mi sentis min de mia vilaĝo envolvata, kiel de la brakoj de mia patrino. Por mi ĝi ne plu estis tiu nepreciza io ŝvebanta inter la horizonto kaj la supro de niaj montaroj, niaj du mondfinoj. Ĝi estis rimarkinde malpliĝinta, dum mia universo senlimiĝadis, sed ĝi estis alpreninta formon kaj firmecon. Mi estis nur knabeto inter multaj aliaj, ĝi estis nur vilaĝeto inter multaj aliaj, sed, kiel mi, ĝi havis difinitan nomon; kiel mi, ĝi havis sian lokon en la universo; kiel mi, ĝi estis amata; kiel mi, ĝi estis viva. Jen tio, kion mia avo enblovis en min, tie sur la montetosupro, samtempe, kiel li instruis al mi, ke la horizonto neniam estas fino de io, sed ĉiam komenciĝo de aliloko.....

.....Mole sida ĉeborde de la marovasto mi travivadis beatan ĉiamon, entutigon de pro tenereco disradianta hodiaŭ kaj de morgaŭ pli promesentena kaj kantoplana, ol printempa fonto. Mi nesciis, ke la milito traĉiele baldaŭ blovos, ke la unua vojo al miaj revoj pri vasteco proponota estos senrevena tunelo nigra, prema, ĉar anstataŭ tenereco mian koron batigos teruro. Sed mi nesciis krome, ke mia vilaĝo estis jam difinita la ritmon de nia paŝado, la nuancojn de la rigardo la mondon al mi proponanta, la intensecon de mia akceptemo al la kanto de l'vivo.....

....."Ĉe ni, en la vilaĝo", homoj diradis apud mi. "Ĉe ni, en la vilaĝo", Libananoj elvokas tie kaj ĉi tie tra la mondo. Kaj miras miaj eksterlandaj amikoj, kiam Libanano diras: "Ĉe ni, en la vilaĝo", kial ŝajnas al ni, ke ni aŭdas: "Ĉe ni, en la paradizo"? Tiom nin surprizas la profunda beateco de li esprimata! Ho frato el

el eksterlando, kie ci enradikiĝis? Kie la terpunkto, -kiu en ci bruas, kvazaŭ oni sentus alsuprantan plantosukon? Ho frato el eksterlando, mi, kiel ci, vidas, ĉar difinita terpunkto min favoris per la realo, kiel antaŭgusto de l'eterneco. Mi aŭdas, ĉar difinita terpunkto havas la voĉon de mia patro kaj tiun de mia patrino. Mi amas kaj mi sentas min viva, ĉar estas difinita terpunkto, kiu knedis min per sia kredo kaj amo.....

.....Kial moviĝi? Marŝi, tio estas iri renkonte al iu aŭ al io. Rigardi, tio estas rekonii iun aŭ ion. Aŭskulti, tio estas aŭdi aŭ atendi iun aŭ ion. Kaj ridi...kaj kuri...kaj kanti...kaj ludi...kaj preĝi...kaj petoli...kaj kri-diri sub lumobрила certeco: "Panjo, mi amas cin. Ĉu ci amas min?" Panjo! De tiam mi povis ami cin nur en malespero kaj estis pli aĉe, ol la plej nigra nokto.....

.....Ci estas milda kaj fajra, kiel sciuro, kaj babilema...Alaho! kiel babilema ci estis! Ci diris al mi poste: "Estis ja necese, ke mi parolu por du." Ci ne aldonis: "Ankaŭ ke mi amu por du, ke mi vivu por du." Ĉi tion tamen ci faris; tial mi asertas, ke ci amis min per patrino koro. Kiam knabeto dumnokte ellitiĝas, ĉar alia knabeto estas ploranta, kiam li ĉirkaŭbrakas lin simplavorte dirante: "Ploru, Nasim, al ci ridetos mi ĉar...ho! se almenaŭ mi povus esti cia patrino nur dum unu sekundo, almenaŭ kiam ci ploras..." Ĉe sepjarulo tio estas kulmino de komprenemo, de kundivido kaj amo. Kaj ci ridetis kun larmoj en ciaj okuloj, en cia voĉo. Tamen ci ridetis bravule, varmige, mirinde.....

.....Ni scipovis eldiri la nuancojn de ĉiuj matenuĝoj al la sezonoj modeliĝantaj, kaj la pacon de la vesperkrepuskoj stelen malfermiĝantaj; mi scipovis eldiri la maron arĝente trasulkatan de leviĝanta luno, ronda kaj mielvejnita super la montaroj; mi scipovis eldiri la mildan pluvokraketon, kiam ĝi sensoifigas la grundon; la flustradon de ĉiu folio al la vento forlasiĝanta kaj la ĉielon en la aŭtunaj flakoj, super kiuj ni kliniĝis kun la espero ekkapti la nubojn. Mi scipovis eldiri la bruojn vesperajn kaj matenajn, la paŝadon kaj voĉojn de ĉiuj enloĝantoj en mia vilaĝo. Ĉu tio ĉi estas perdita porĉiame?.....

.....Patro mia, patrino mia, mi lernis ekflegi la vunditojn, kuraĝigi,

konsoli, malbruske levi brankardon por eviti la dolorajn skuojn, impeti al ambulanco kun enbraka estuleto senreaga, tamen eble pluvivanta. Ĉe agonianta infano mi retrafis viajn vortojn kaj gestojn por trabati al mi la vojon al ĝia terurego. La brakojn mi rondigas lulilforme, la tutan domomildecon disverŝanta, la cian patrinjo, kiam mian febron ci luladis, kiam leviĝis cia kanto en la krepuska duonombro, kvazaŭ incensa parfumo en sanktejo. Cian kanton, panjo, kiel povus mi ĝin forgesi? Tiomfoje mi ĝin aŭdis en ŝirmejoj, sur la lipoj de mil patrinoj milobligatan. Ĝin ankaŭ mi kantis por infanoj senpatrinaj kaj apudestis la vizaĝo cia, kun la viva melodio al cia voĉo religita por forpeli la teruregon, milda, tiel milda en la mortobruego, leviĝanta laŭ spiraloj el la preĝado, espero kaj certeco.....

..... Patro mia, patrino mia, plaĉintus al mi scipovi pentri kaj la nedireblon desegni per lumkoloroj; plaĉintus al mi scipovi flutludi kaj la nedireblon moduli laŭ lumotriloj; plaĉintus al mi esti poeto kaj la nedireblon rimi laŭ lumokadencoj. Ĉar min titolinte "via animo" kun via rigardo al tenereco, viaj brakoj tiel varmaj pro tenereco, viaj vortoj tiel helaj pro tenereco, viaj manoj la miajn kunmetantaj por preĝo al tenereco, vi faris el mi lumon por la eterno de ĉiu korbato mia. Min titolinte "via hejmo", vi faris el mi hejmon al la tuta mondo malfermatan. En tiun hejmon neniam envenos milito.

(Elтира[oj] tradukita] de S. Boniol)

(Daŭrigota)



ESPERANTO KAJ

KINO

Redaktis: Jean Forge-Fethke

(11)

LA FILMMANUSKRIPTO

La plej grava fundamento de la filmo estas la manuskripto, la scenario. En la naskiĝa periodo de la unuaj filmoj la reĝisoroj havis la manuskripton en la kapo, poste ili notis la agadon sur siajn manumojn, kaj kiam tiuj ĉi ne sufiĉis, en malgrandan notlibron.; kaj tiel iom post iom kreiĝis la filmmanuskripto, kiu ŝanĝiĝadas kaj pliperfektigas konstante, samgrade kun la evoluo de la filmtekniko. Kiam oni hodiaŭ enpaŝas en la filmlaborejojn, oni rimarkas sur speciala tablo dikan, kelcentpaĝan manuskripton, en kiun, krom la maŝinskribitaj scenoj, estas margene skribitaj multaj notaĵoj de la reĝisoro. La manuskripto en sia nuna formo estas produktaĵo de multaj kapoj, kiuj, en mult-semajna komuna laboro elcerbumis kaj formis ĝian enhavon. La nuna sonanta filmo postulas la precizan fiksadon de la sceno (optika agado); de la dialoga parto, de la muzika kaj akustika agado - krome la teknikajn rimarkojn koncerne la aparato-movojn, ktp...

Multaj homoj pensas, ke ili estas naskitaj filmpoetoj. La dramaturgoj en la grandaj filmfirmaoj, kiuj esploras kaj kontrolas la amase proponatajn filmmanuskriptojn, povus rakonti groteskajn fabelojn pri la diletantaj laboraĵoj, kiaj elkreskas el la cerboj de filmavidaj junuloj, kinofrenezaj knabinoj - eĉ kuiristinoj kaj kamenpurigistoj! La grandaj ĵurnaloj, kiuj de tempo al tempo aranĝas publikajn konkursojn pri bonaj filmideoj, ĉiam denove disvastigas la opinion en la publiko, ke ĉiu homo povas esti filmverkisto. Tiu ĉi opinio estas erara.

Tamen, povas okazi, ke iu homo vizitanta kaj studanta tre ofte filmojn en la kinoteatroj, havas taŭgan ideon, la fundamentan elirpunkton por la posta filmlibro. La procedo de la naskiĝado de la finforma filmlibro havas multajn etapojn kaj ĝi komenciĝas preskaŭ ĉiam per la t.n.

"exposé", sinoptika skizo de la filmo. Tiu ĉi skizo ampleksas ĉirkaŭ 6-8 maŝinskribitajn paĝojn kaj donas la ĉefan agadan linion, la muzikajn kaj akustikajn eblecojn de la filmo. La "exposé" estas la bazo por ĉio, kio sekvos poste. Estus por komencanto tute sencece verki dikan manuskripton kun detale ellaborita scenario; neniam li sukcesus emigi dramaturgon tralegi tian dikan libron. La sinoptika skizo rapide informas la firmaon pri la ideo, temo, agado, ĉefaj rolantoj, muzikaj eblecoj kaj, kio estas plej grava, ĝi ebligas al la firmao proksimuman kalkulon de la kostoj de la filmo. La mono ludas en la produktado gravan rolon; kelkaj temoj estasprodukteblaj per malpli granda monsumo, aliaj temoj postulas pli altajn, ofte fantaziajn kostojn. Laŭ tiu ĉi rilato oni tute ne povas kompari la filmmanuskripton kun romano. La prezoj por presado de romano restas ĉiam la samaj, sed la kostoj por filmigo de scenario estas treege malegalaj! Ne estas do mirige, ke la filmigo de manuskripto ne estas facila afero kaj ofte la plej bona ideo ne trovas intereson ĉe la filmistoj

La sonanta kaj parolanta formo de la hodiaŭa filmo plimalfaciligis la situacion por la filmverkisto; Dum la muta periodo de la filmo estis la unua postulo: optika moviĝo de la bildo! Hodiaŭ la dialogo kaj la sinkrona muziko ludas gravan rolon en la kreado de manuskripto, en la elekto de la temo entute!

Ne estas iu dubo pri tio, ke la optika flanko de la filmo restas ĝia ĉefa elemento, ke la parolo kaj sono estas apudaj akcesoraĵoj, tamen jam intime ligitaj kun la moviĝanta bildo.

La parolata vorto, la dialogo hodiaŭ estas adaptata en preskaŭ ĉiu filmo, alproksimigante ĝin al la formo de l'teatro. Ankoraŭ ekzistas plej ofte disonancoj, strangaj malakordoj, kiujn kreas la parolo. Ĉar la dialogo ĝenerale estas la malamiko kaj malhelpanto de l'agada rapideco; ĝi ne permesas sufiĉe la rapidan ŝanĝiĝon de la scenoj; kaj jen estas la tasko de filmverkisto saĝe kaj sprite interplekti la parolon kun la sceno. La dialogo neniam haltigu la agadon sed kontraŭe estu elemento antaŭenpuŝanta. La dialogo devas esti fiksata precize en la filmmanuskripto antaŭ ol la

reĝisoro, kun sia stabo, eniras la-filmlabor-ejon. Same la alilingvaj variantoj devas esti fiksataj antaŭe, por kio necesas lingvaj spertuloj, kiuj ellaboras la tekstojn kaj ŝanĝas tiun aŭ alian parton, kiu ne respon-das al la idearo de la koncerna lando.

Simile la kanto ludas tre gravan rolon en la filmo, precipe en la filmpoperetoj kaj komedioj. La komponistoj de la "sezonaĵ danckantoj" startigas siajn melodiojn pere de la sonantaj filmoj, kiuj popularigas tiujn "danckantojn" tra la tuta mondo. La eldon-ejoj de muziknotoj same profitas de tio kaj precipe la gramofondiska industrio pli ekfloris sekve de la sonanta filmo, kies melodioj instigas la publikon al aĉeto de la koncerna disko. Tiun ĉi fakton kompreneble la filmverkisto devas priatenti; la temo devas doni al la komponisto eblecojn kaj okazon por kreado de tiaj kantoj. La film-verkisto, plej ofte sklavoj de la publika gusto, devas sekvi la dezirojn de la fabrik-istoj, kiuj preskaŭ neniam priatentas la vorton "arto", sed ĉefe kaj ĉiam la vorton "negoco".

Speciala ĉapitro estas la filmigo de romano aŭ teatraĵo. La filmfabrikistoj treege ŝatas filmigi librojn, kiuj havis sukceson. La opinio, ke oni facile entiros la legintojn en la kinojn, estas tute prava. Krome la filmfabrikistoj opinias, ke libro presita ja ĉiuokaze prezentas ian valoron, ĉar la romano ja trapasis jam la cenzuron de la eldonistoj, de homoj ja ankaŭ sufiĉe saĝaj kaj negocspertaj; dum originalaj filmmanuskriptoj prezentas, en sia maŝin-skribita formo, ankoraŭ nenion konkretan kaj plej ofte entenas ian tendencon al risko!

La transformado de la romanmanu-skripto en filman formon estas malfacila tasko. Multaj filmverkistoj asertas, ke verkado de originala filmmanuskripto estas pli facila ol transformado de romano, ĉar ofte la sukcesaj romanoj enhavas malmulte da optika agado. Ofte estas malfacile redukti la agadon de kelkcentpaĝa libro al la rubando de duhora filmo. La dialogojn oni plej ofte ne povas transpreni en ilia romanformo. La enhavo ofte devas esti ŝanĝata laŭ filmaj vidpunktoj. Kelkaj figuroj devas forfali, novaj devas kreiĝi. Tamen oni devas gardi la linion de la libro, proksim-iĝi al la spirito de la aŭtoro.

Ofte okazas, ke la firmao dungs kelkajn verkistojn por la kreado de la film-manuskripto. Ili ofte malpariĝas inter si; la firmao dungs novajn filmskribistojn, kiuj denove ŝanĝas tion, kion kreis la aliaj. Venas la aŭtoro, kiu akre protestas, kaj ofte tiuj miskomprenoj finiĝas per procesoj. Ĉio ĉi ne favore influas la manuskripton, kaj la legintoj de la romano ofte ne re-konas poste la romanon sur la ekrano.

La cirkonstancoj en kiuj naskiĝas hodiaŭ filmmanuskripto estas tre malfacilaj kaj kaosaj. La individuo de la aŭtoro, gardata absolute en la romano aŭ teatraĵo, perdiĝas en la komplikita maŝinaro de l'filmindustrio. Bedaŭfinde - ĉar nur flanke de la aŭtoro povas veni novaj ideoj, kiuj levos la filmon sur pli altan nivelon - plej ofte la spirito regas la maŝino, ne inverse! La filmmanuskripto estas kaj restas la fundamento de ĉiu filmo, kaj nur el la manuskripto povas elkreski la arta filmo, kian ni ĉiuj tiom aspiras!

ni ridu

"Nekredeble!", ekkrias viro sidanta kun geamikoj. "Imagu! Antaŭ kelkaj tagoj mi estis en restoracio. La kelnero, aparte malrapida, ne paŝis sed vere sin trenis. Mi diris al li: "amiko, ĉu vi havas varikojn?". Divenu kion li respondis. "Minuton, sinjo-ro; mi tuj petos de la kuiristo;" Ĉiuj ĉeestantoj ekridegas, krom iu viro, kiu diras: "Al mi neniam okazus io tia.". "Kial do?"; " Ĉar mi ĉiam legas la menuon antaŭ ol mendi."

Survoje al ĉastereno s-ro Nurmi, fama ĉasisto, rakontas al siaj amikoj: "Mi mortpafis leonon en Afriko, tigron en Hindujo; mi neniam maltrafas la celon." Subite ekflugas fazano. "Pafu!" krias la amikoj de s-ro Nurmi. Tiu ĉi celas, pafas, sed... la fazano daŭrigas sian flugadon. S-ro Nurmi simple diras: " Gesinjoroj, vi ĉeestis veran miraklon. Vi vidis fluganta mortintan fazanon!".

Homaro kaj naturo

— Maxim Gorki —

Inter neĝkovrataj montoj profunde kuŝas ĉielblua lago. Kiel reto, la faldoj de la ĝardenoj, hele kolorigitaj, falas al la akvo. Blankaj domoj, kiel sukerpeĉoj, rigardadas malsupren de la bordo en la lagon: la ĉirkaŭaĵo estas kvietaj kaj paca kiel dormanta infano.

Estas matene. Odoro de floroj venas de la montoj sur milda vento. La suno ĵus leviĝis, la roso ankoraŭ briletas sur la arbofolioj. La vojo, griza rubando, penetras tra la kvietaj montfendegoj, vojo ŝtonpavimita, tamen tiel veluraspekta, ke oni deziras ĝin karesi. Apud amaso de ŝtonoj sidas laboristo, simila al malhela skarabo; sur la brusto troviĝas medalo; lia esprimo estas serioza, forta, tamen afabla. Metante la sunbruligitajn manojn sur la genuojn, li esploris la vizaĝon de la preterpasanto, haltinta sub la ombro de kaŝtanoarbo, kaj diras: "Jen la montaro Simplon, sinjoro, kaj mi ricevis ĉi tiun medalon pro mia laboro dum la konstruo de la Simplon-tunelo." Silente li rigardas kaj ridetas al la brilanta medalo. "Ja, ĉia laboro estas dura en la komenco ĝis oni alkutimiĝas, sed poste ĝi fariĝas ordinara kaj facila. Sed, vere, ĝi estis ja malfacila tasko."

Li iomete skuas la kapon kaj ridetas al la suno; tiam li subite haltas kaj malsignas: la nigraj okuloj ekbrilas. "Kelkfoje mi timis - sendube la tero posedas sentkapablon, ĉu ne? Kiam ni subteriĝis ĝis granda profundeco, kiam mi faris gravan vundon en la monto, ŝi nin akceptis kruuele. Ŝi spiris varmege sur nin kaj haltigis la batadon de la koroj, kapturnigis nin kaj dolorigis la ostojn. Multaj tion spertis. Tiam la patrino tero elverŝis ŝtonojn sur siajn infanojn, elverŝis varmegan akvon super nin; ja, tiam mi timis, sinjoro! Kelkfoje la akvo sub la torĉlumo ruĝiĝis kaj la patro diris al mi, ke mi vundas la teron; pro tio ŝi dronigos nin, kaj per sia sango bruligos ĉiujn; vi certe tion vidos."

"Eble tio estis nur imago, sed kiam oni aŭdas tiajn vortojn el la profundaj intestoj de la tero, en la malseka kaj sufokanta mallumo, inter la morna plaŭdado de l'akvo kaj la grincado de fero kontraŭ ŝtono, tiam oni forgesas, kiom oni fantazias! Ĉar ĉio estis fantazia tie, kara sinjoro; ni, homoj, estis tiel malfortaj kaj la monto, en kies internajon ni boris, ŝajne supren-

leviĝas ĝis la ĉielo. Necesas vidi por kompreni! Necesas, ke oni vidu la grandan faŭkon, elboritan de la malfortuloj, kiuj ĝin eniris je sunsubiro! Kaj kiel melankolie la suno rigardas post tiuj kiuj lin forlasas por iri en la intestojn de l'tero! Necesas, ke oni vidu niajn maŝinojn kaj la timigan vizaĝon de la monto, ke oni aŭdu en ĝi tondrajn murmurojn kaj la eksplodon similan al sovaĝa ridaĉo de frenezulo."

Li rigardas la manojn, ĝustigas la medalon sur sia blua bluzo kaj ĝemspiras. Li daŭrigas kun plena fiero: "La homoj kapablas labori. Jes, sinjoro, la malfortulo, kiam li vere volas labori, estas nevenkebla forto! Kaj kreu min: finfine, la malfortulo faros ĉion, kion li volas. Komence la patro ne kredis je tio. "Traŭranĉi monton de lando al lando, li diris, jen, kio estas kontraŭ la volo de Dio, kiu apartigas landojn per montmuroj; vi vidos, ke la Dipatrino ne benos nin!" La maljunulo eraris; la Dipatrino benas ĉiun, kiu amas ŝin."

"Poste la patro kredis same kiel mi nun kredas kaj konfesas al vi, ĉar li sentis sin pli granda kaj pli forta ol la monto; sed estis tempo, kiam, sidante ĉe tablo kun botelo da vino, li rakontis al mi kaj aliaj: "Infanoj de Dio - tio estis lia plej-ŝatata diraĵo, ĉar li estis ĝentila viro - Infanoj de Dio, vi ne rajtas batali kontraŭ la tero tiamaniere; ŝi venĝos sin pro siaj vundoj kaj restos nevenkebla! Vi vidos; kiam ni penetros tra la montaro ĝis la koro, kiam ni tuŝos la koron, ĝi bruligos nin, ĝi ĵetegas fajron sur nin, ĉar la koro de la tero estas fajra, ĉiu scias tion! Kulturi la grundon signifas helpi ĝin naskigi; oni instruas nin fari tion; sed nun ni detruas ĝian fizionomion, ĝian formon. Vidu! Ju pli profunden ni fosas en la monton, des pli varma fariĝas la aero kaj des pli malfacile estas spiri."

La viro ridas kvietaj kaj kirlas la lip-harojn per ambaŭ manoj. "Ne nur li opiniis tion, kaj li estis prava; ju pli ni pluiris en la tunelon, des pli varma fariĝis la aero, kaj homoj falis senfortigitaj kaj svenis. Akvo elŝprucis subite el la varmegaj fontoj; tutaj vejnoj de la tero malsuprenfalas, kaj du el niaj kamaradoj de Lugano freneziĝis. Nokte, en la kazino, multaj el ni babilis dum deliro, ĝemis kaj sidigis sur la litoj pro teruro."

"Ĉu mi ne estas prava?" diris la patro, kun timo en la okuloj, tusanta pli kaj pli raŭke, jes sinjoro, "Ĉu mi ne estas prava?, li diris. Ĝi estas nevenkebla, la tero." Fine, la maljunulo kuŝiĝis lastafoje. Li estis tre forta, mia maljunulo; dum pli ol tri semajnoj li brave luktis kontraŭ la morto, kiel homo konanta sian valoron kaj neniam plendanta. "Mia laboro estas finita, li diris al mi ofte dum la nokto. Zorgu pri vi mem kaj reiru hejmen; lasu al la Dipatrino gvidi vin." Tiam li silentiĝis por longa tempo; li kovris la vizaĝon kaj preskaŭ sufokiĝis."

La homo staras, rigardas al la montoj kaj sin streĉas tiel forte, ke la tendenoj krakas. Li prenis mian manon, tiris min al si kaj diris, "estas la solena vero. "Ĉu vi scias Paolo, mia filo, spite ĉion, mi kredas, ke oni tlon faros: ni kaj tiuj, kiuj antaŭenvenas de la alia flanko, renkontiĝos sub la monto; ni renkontiĝos, ĉu vi kredas? Mi ja kredis, sinjoro. "Do, filo, vi devas; ĉio devas esti farata kun forta kredo je feliĉa fino kaj je Dio, kiu helpas bonajn homojn per la preĝoj de la Dipatrino. Mi petegas vin, mia filo, se tio okazos, se la homoj renkontiĝos, venu al mia tombo kaj diru: "Patro, estas farite," por ke mi sciu.

"Estis bone, kara sinjoro; mi promesis al li. Li mortis kvin tagojn post miaj vortoj, kaj du tagojn antaŭ ol li mortis, li petis min, ke mi enterigu lin ĉe la loko, kie li lastafoje laboris en la tunelo. Li preĝis, sed mi opiniis, ke tio estis dum deliro..

"Mi kaj la aliaj, kiuj venis de la kontraŭa flanko renkontiĝis sub la monto dektri semajnojn post la morto de la patro. Estis freneziga tago, sinjoro! Kiam ni aŭdis tie, sub la tero, en la mallumo, la bruon de la laboristoj, la bruon de tiuj venintaj por renkonti nin sub la tero, vi komprenas, sinjoro, sub la grandega pezo de la tero, kiu povus tuj dispremi nin, etaĉuloj, se ĝi nur sciis! Dum multaj tagoj ni aŭdis tiujn rulsonojn; ĉiun tagon ili fariĝis pli kaj pli laŭtaj, kaj la ĝojo de venko frenezigis nin; ni demone laboris, kiel senkorpuloj, ne sentantaj lacecon, ne bezonantaj instrukciojn; vere estis bone, kiel danco dum sunbrila tago! Ni ĉiuj fariĝis bonaj kaj ĝentilaj al unu la alia, kiel estas infanoj. Se vi nur sciis, kiel forta, kiel intense pasia estas la deziro: renkonti homon en tiu

mallumo sub la tero, en kiun oni estas penetrinta dum multaj longe daŭrantaj monatoj."

Lia vizaĝo ruĝiĝas, li proksimiĝas al la aŭskultanto, esploras lian vizaĝon per brulantaj okuloj, kaj daŭrigas trankvile kaj ĝoje: "Kiam la lasta muro finfine dispeciĝis kaj tra la aperturo aperis la nigra lumo de torĉo kaj malhela vizaĝo larmkovrita pro ĝojo, kaj poste alia vizaĝo, pli da torĉoj, pli da vizaĝoj, krioj de venko resonis, krioj de ĝojo! Ja, estis la plej bela tago de la vivo, kaj kiam mi pripensas, mi sentas, ke mi ne vivas vane! Estis laboro, mia laboro, sankta laboro, sinjoro, mi diras al vi, jes!, jes!, ni kisis la venkitan monton, kisis la teron; tiun tagon mi pli ol antaŭe amis la teron, sinjoro, mi enamiĝis al ĝi, kvazaŭ al virino!

"Kompreneble mi iris al la patro! Kompreneble, kvankam mi ne scias ĉu la mortintoj povas aŭdi, sed mi iris, oni devas respekti la dezirojn de tiuj, kiuj pene laboris por ni kaj kiuj suferis ne malpli ol ni suferas, ĉu ne, sinjoro? Jes, jes, mi iris al lia tombo, frapis per la piedo la teron kaj diris, kiel li deziris: "Patro, estas farite. La homoj venkis. Estas farite, patro!"

Tradukis: B.M. Newell



POR VIA DISTRO



SILAB-ENIGMO

BIN - BLO - BRA - BRI - BUS - CIT - DI - DO - DO - DO - GO - GRE - GUZ - KO -
KO - KO - KRE - KRI - LAS - LI - LO - LO - LUN - MAR - MAR - MI - MO - MO -MO-
MOS - MUS - PEK - PRE - PRO - REK - RO - RO - SLE - STE - TA - TA - TET - TO -
TO - TO - TO - TO - TRA - TRE - VEN - VI - VIS - ZO - ZO.

El la 54 silaboj formu 27 dusilabajn kaj kvinliterajn vortojn kun la sekvantaj signifoj:
1- Kuranta aero. 2- Movetiĝi pro timo. 3- Brutaro. 4- Malkurba. 5- Slava muzikilo. 6- Parto
de muro. 7- Malunua. 8- Antikva korda muzikilo. 9- Strata veturilo. 10- Vinbersuko. 11-
Ensaligi viandon. 12- Homa korpoparto. 13- Nomo de monato. 14- Laktosupraĵo. 15-
Arbara kreskaĵo sur ŝtonoj. 16- Malverso. 17- Angla kartludo. 18- Glitveturilo. 19- Nomo
de tago. 20- Pekego. 21- Firmigi libron. 22- Sovaĝa koketo. 23- Mondmono. 24- Nomo de
tago. 25- Vendvaloro. 26- Skulptaĵo. 27- Buŝe movi la aeron.

La mezaj literoj de la vortoj formas proverbon, kies pravecon konfirmas multegaj
spertoj.

LA VIVO EN GRESILLON

PRI VUNDITA ARBO

Staris apud la kastelo akacio pli ol centjara. Ĝiaj supraj branĉoj defiis la tegmentojn. Kiel homa vizaĝo, ĝia trunko prenis sulkojn, vertikalajn, pro la aĝo. Ĝi ornamigis per ondetoj de la piedo ĝis la kapo.

El la trunko, jam de longe, ŝprucis ĉefa branĉo, kiu fariĝis dika, dikega, pli kaj pli similanta la "patron" pro sia foliaro, pro siaj sulketoj. Ankaŭ ĝi naskis branĉetojn, kiuj egiĝis kaj siavice disbranĉiĝis. Ili fariĝis multaj kaj pezaj. Ŝajnis, ke ili emas iom liberiĝi, malproksimiĝante al la prapatra trunko. Verŝajne ili ne plu deziris la "familian intimecon". Ili fariĝis pli kaj pli pezaj kaj ŝajnis tiri la ĉefan branĉon for de la prapatro. Sed la akacio firme staris.

Iam, la unuan fojon, la arbo, superŝarĝita de la jaroj kaj de la idaro, ne plu povis elteni. Aŭdiĝis kraketoj similaj je plendoj; kraketoj kiuj fariĝis krakoj. Subite la plendo fariĝis krio. Tirata de sia idaro la ĉefa branĉo forlasis la patran trunkon. La foliarkovritaj branĉetoj aŭdigis bruon nedifineblan: ĉu ridoj? ĉu timoĝemoj?

La ĉefa branĉo falis sed ne tuj for; ĝi provis sin teni je la trunko. Ŝajnas ke tiu ĉi diris: "Sekvu vian posteularon! Lasu min en tiu loko, kie mi naskiĝis, vivis, kaj baldaŭ mortos. Iru do!" Eble la ĉefa branĉo respondis: "Adiaŭ! Mi sekvu ilin." Krak! Lasta fortega plendo: de kiu? ĉu de ambaŭ?

Falante teren, junaj branĉoj grave vundiĝis. Ili ne sciis, ke la grundo estas malmola. Ili ripozis tie esperante, ke malaperos la vundoj, revenos la fortoj. La folioj velkis iom post iom. La ĉefa branĉo fartis senhelpa; ĝi ĵetis senesperan rigardon al sia posteularo, kiu altiris ĝin teren; ĝi vidis nur mortintojn kaj mortontojn. Ĝi rigardis al la trunko.

La trunko staris rekta, majesta...sola en sia sulka ŝelo. Tamen, ĝi ne rigardis teren, sed supren. Al branĉeto, kiu svingis al ĝi siajn folietojn. Kvazaŭ komplace.

P.B.

NORMANDAJ RAKONTOJ

de Guy de Maupassant

esperantigis R. DUPUIS

bonega traduko de ĉefverko

Prezo : 36,00 FF

NIAJ PERKORESPONDAJ KURSOJ

POR LA KOMENCANTOJ: Kurso per mem-korekta metodo. Tiu metodo ebligas progresadon adaptitan al la ritmo elektita de la lernanto, kiu, paŝon post paŝo, korektas mem siajn erarojn. Testo-folioj sendotaj al la korektanto ebligas kontrolon. La korektanto tiam atentigas la lernanton pri la lingvaj punktoj ankoraŭ ne bone asimilitaj.

La prezo de tiu kurso estas: 200 fr. fr.

POR LA PRAKTIKANTOJ: por akiri la praktikadon de la lingvo. Ilustrita kurso, tekstoj, gramatikaj rimarkoj, taskoj sendotaj al korektanto.

La prezo de tiu kurso estas: 200 fr.fr.

SUPERA KURSO: De- kaj al-tradukoj, atentigoj pri gravaj gramatikaj punktoj, ĉefaj eroj de la historio de Esperanto. Bona preparado al la Atesto pri Kapableco.

Prezo de la kurso: 150 fr.fr.



Kien li iras ?

Al GRESILLON
kompreneble!

Ĉu ankaŭ vi ?

Petu informojn: ESPERANTO

Kastelo Gresillon. 49150-BAUGÉ

NIA LIBRO-SERVO

(J. Vincent, 26bis, rue de Milngavie, F-49150 BAUGE)

POR LA PRAKTIKANTOJ: (P. Babin) - Taŭga por paroliĝi progresantojn.
5-a eldono - 35 fr.fr.

GRAMATIKA GVIDLIBRO: modernigita prezento - 50 fr.fr.

PREPARADO AL LA ATESTO PRI KAPABLECO: (A. Ribot) - 3-a eldono reviziita -
Prezo: 30 fr.fr.

kaj ĉiuj interesaj libroj. Katalogo havebla senpage (Vidu la supran adreson)

GRAMATIKO PER BONHUMORO

Esti de sia tempo :

LA POSESIVOJ

- LIA** : Petro promenas kun siaj gepatroj ;
lia patro portas la piknikon, kaj lia
patrino tenas lian manon (de Petro).
- ŜIA** : Sofia ludas kun sia hundo ; ŝia robo
: iom makuliĝis.
- ĜIA** : Sofia havas hundon ; ĝiaj oreloj estas
: longaj.
- ILIA** : La infanoj ludas en la ĝardeno ; iliaj
krioj estas surdigaĵ.
- Rimarkoj** : Oni devas atenti pri la verbo kaj la
subjekto ; SIA ĉiam akompanas la
komplementon, neniam la subjekton :
la patro faris decidon, kiu mirigis
lian edzinon
la patro faris decidon kaj devigis
sian filon obei.



- Mi petas vin, sinjoro Direktoro, miaj referencoj estas en viaj manoj. Iliaj indikoj estas kontentigaj. « Ŝia tajpado estas rapida ». Ortografio estas nur arkaika lernobjekto !

Hezito :

Miskompreno :



- Ŝia koro batas : « Ĉu li konfuziĝas pro mia beleco ? »
- Lia koro batas : « Kial ŝi estas nigre vestita ? »



- Mi ŝatis ricevi mian bileton por Romo. Mia frato petis min preni ankaŭ lian.
- Ne eblas. Li devas mem preni sian.

Niaj perantoj

- Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (250 aŭstr. ŝil.).
- Belgio** : Eldonejo Librejo Sonorilo vzw Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk - P&K : 000.0152140-44 (560 B.F.).
- Britujo** : John C. Rapley, 17 The Grange, Shepherdswell, Dover, Kent CT 15 7 Q B. (10 pundoj).
- Danlando** : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (90 kronoj).
- Finnlando** : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (70 mk.).
- Germanujo** : Annelis Rudolf, DACHSBERGSTRASSE, 1 W 3507 BAUNATAL p&K. Frankfurt (M. 2759 35-609) (25 D.M.).
- Hispanio** : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10*-D 03003 ALICANTE - (1 700 peset.).
- Italio** : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - p&K : 42 37 12 03 Literatura Foiro (20.000 liroj).
- Japanio** : S-ro Tara Nišiumi, section Seiyōshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaši-Nakano, Hatiōziši TOKYO-TO, J-192.03 (2700 jenoj - aerpoŝte : 3250 jenoj).
- Nederlando** : Gerard van der Horst, Hengelolaan 1158, 2544 GT DEN HAAG poŝtkonto : 39743. (28 fl.).
- Nov-Zelando** : Sino Gwenda Sutton, 12 c Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1 (aerpoŝte : 18 n.z.dol.).
- Pollando** : Pola Esperanto-Asocio, ul. Krucza 38/42 00512 VARSOVIO (15 us. dol.).
- Portugallio** : Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. João Couto, 6, R/C-A - 1500 Lisboā (2.800 esk.).
- Svedujo** : Sveda Esperanto-Asocio, Södra Rörum, pl. 455, S-242 94 Hörby - p.k. : 2012-3 (80 kr.).
- Svislando** : Esperanto Perkoresponde, Claude Gacond, strato Chevreuils 14, CH-2300, La Chaux-de-Fonds, PK.23-4669-1 (22 s.f.)
- Usono** : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (15 us. dol. - aerpoŝte : 20 us. dol.).
- Aliaj landoj** : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 15 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj. Aerpoŝte : 20 us. dol.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncintajn

Akceptas :

- Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
- Por eklerni aŭ plulerni ia internacian lingvon ;
- Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
- Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
- Por studi specialajn problemojn ;
- Por inter amikoj gaje libertempi ;
- Por ekskursi tra cent-rokcidenta Francujo.

venu al la esperantista kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkuponono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, F-49150 BAUGÉ. — Tél. 41-89-10-34